Mirmekobo 15



OKTOBRO 2011

MIRMEKOBO 15

oktobro 2011

Redaktoro: Donald Broadribb

La URL de la retejo de Mirmekobo estas:

http://web.me.com/donbroadribb1/

La bildo sur paĝo 1 montras parton de la bebpanda vartejo en Sichuan Wolong, en Ĉinio.

TABELO DE ENHAVO

arkeologio Antikvaj ŝuoj (de Donald Broadribb)...3
rakontoj historiaj Io pri amo (de Jadranka Mirić)...10
filozofiaĵo La lasta diino (de Carmel Mallia)...14
ironiaĵo (de Ludoviko)...15
historio de la scienco Geometrio kaj sfera astronomio en la unua greka kosmologio, parto 1 (de Marcel Lemeltier)...16
religia poemo Indiana preĝo (tr. Massimo Speltoni)...21
humuro Serio de parodioj en la stilo de famaj rusaj poetoj je infana popola kanteto “Griza Kapreto” (de Tatjana Auderskaja)...22
mito Narciso kaj Eĥo (de Ovidio, resumita de Donald Broadribb)...25
skribas leganto Pri puntado (de Françoise Noireau)...26
satiro Patrujamanto (de Tefi, tr. Yenovk Lazian)...27
poezio La nigra muro (de Julio Szabo)...30

Specialaj Bildoj

Aŭstralia marsupiulo *quokka* p.12
Aŭstralia marsupiulo *bilby* p.14
Aŭstralia marsupiulo *suda marsupiula talpo* p.15

Ĝenerala Informo

Mirmekobo estas per-interreta eldonaĵo senpage abonebla, ankaŭ individuaj numeroj estas senpage haveblaj. Ĉiu persono rajtas kontribui al la enhavo de Mirmekobo. Neniu surpapera formo de Mirmekobo ekzistas. Tamen, se vi mem deziras presi per via komputilopresilo por vi aŭ por alia(j) persono(j) ekzemplerojn de Mirmekobo, tion vi rajtas libere fari. Ankaŭ la perretan formon vi rajtas libere dissendi

arkeologio

Antikvaj ŝuoj

de Donald Broadribb (Aŭstralio)

Ĉar ili konsistas el pereema materialo, piedvestoj kutime ne postrestas multajn jarojn. Tamen arkeologoj ja trovis specimenojn tute neantaŭvidajn. La plej malnova ĝis nun konserviĝinta kompleta sandala ŝuo estas:



Sandalo el 7300AKE, trovita en Kavo Fort Rock, Oregon, Usono, en 1938
La sandalo konsistas el kunplektitaj fibroj

Relative simila sandala ŝuo trovita en kavo en la usona ŝtato Missouri aĝas ĉ. 8 mil jarojn. Ĝi ankaŭ konsistas el plektitaj fibroj:



Sandalo el ĉ. 6000AKE, trovita en kavo en Missouri


Rimarkindas ke ambaŭ sandaloj (same kiel sandaloj aliloke trovitaj) havas kordojn por teni la piedveston relative fikse sur la piedo. Krome, klaras ke la sandaloj estis individue destinitaj por dekstra aŭ maldekstra piedo, kvankam nur malofte ĝis nun troviĝis sandalparo. Piedvestoj, same kiel aliaj vestaĵoj, tre malofte konserviĝis ĝis nia tempo. Kaj sandaloj kaj ledaj ŝuoj el antikvaj epokoj nur malofte estis lasitaj en loko kiu baldaŭ poste pro ia geografia aŭ geologia

akcidento kovriĝis per koto aŭ rubo kaj tiel faris sufiĉe senaera kaj seka.

La unua trovo de kompleta *leda* ŝuo estis en Armenio dum arkeologia esploro en 2010KE. Laŭ radiokarbona datado, ĝi originis en ĉirkaŭ 3500AKE, do antaŭ kvin kaj duono da jarmiloj. Ĝian konserviĝon kaŭzis ĝia pozicio: preskaŭ senaera kavo, en kiu estis ankaŭ potegoj enhavantaj diversajn grenojn, apud samepoka vinfarejo.



Detaloj de la armenia leda ŝuo el ≈3500AKE
Ankaŭ la ŝulaĉoj estas ledaj



La ŝuo estis parte plenigita per herbaĵeroj, verŝajne por protekti la piedon de la uzanto.[1]

Tiu ŝuo estis iomete pli antikva ol la ŝuo de frostiĝinta viro malkovrita en Ötztal (valo en Tirolo, Aŭstrio):[2]



Konservata en la Sudtirola Muzeo de Artkeologio
Ledaj plandumo kaj bendoj, kun herbaj fibroj por protekti la piedon. ≈3400AKE

En Egipto, en la tombo de Reĝo Tutanĥamun (≈1325AKE) troviĝis 81 ŝuparojn, plejparte tre bonstataj. Inter ili estis ŝuoj kaj uzitaj kaj paradaj (= por uzo nur dum specialaj ŝtateventoj).

1 Vidu: http://news.nationalgeographic.com/news/2010/06/100609-worlds-oldest-leather-shoe-armenia-science/

2 Vidu http://www.iceman.it/en/node/274



Sandalo sur piedo de statuo de Tutanĥamun
Aliaj statuoj en la tombo surhavis similajn sandalojn



Kolekto de la piedvestoj trovitaj en la tombo de Reĝo Tutanĥamun (≈1325AKE)
(Egipta Muzeo, Kairo)[1]



Sandalo de Reĝo Tutanĥamun (≈1325AKE)
(Egipta Museo, Kairo)

1 Vidu detalojn pri la piedvestoj ĉe: http://artofcounting.com/2010/07/14/analysis-of-royal-sandals-in-ancient-egypt-part-1/. (Parto 2 detalas ankaŭ piedvestojn de aliaj egiptaj reĝoj, kun multaj fotoj.)



Funebraj ŝuoj (el Tebo, ≈1000 AKE



Egipta leda ŝuo
©British Museun



Egipta leda sandalo
©British Museum



≈400AKE Helaso



≈335AKE Grekio, Statuo
Templo de Apolono ĉe Delfo, Helaso



Aro da romiaj ŝuoj el ĉ.200KE, trovitaj en puto ĉe Tolgate Farm, Britio



Botoj el Peruo, ≈12a-15a jarcentoj K.E.

Ĝenerale, necesas multe serĉi per la Reto por trovi fotojn kaj informojn pri antikvaj piedvestoj. Se vi serĉos pli da informoj, vi verŝajne plej sukcesos uzante kiel serĉterminon "arkeologio piedvestoj", kaj ankaŭ se vi serĉos la enhavon de la plej gravaj arkeologiaj muzeoj en la mondo. Mi rekomendas ankaŭ la siton http://www.digitalegypt.ucl.ac.uk [Digital Egypt for Universities]. Ankaŭ libron de André Veldmeijer (2010) *Tutankhamun's Footwear: Studies of Ancient Egyptian Footwear.* Liaj detalegaj studoj pri antikvaj egiptaj ŝuoj kaj sandaloj haveblas kiel pdf-oj per la Reto. Ili efektive celas specialistajn vest-arkeologojn, do estas nefacila legaĵo por laiko.

Mirmekobo

estas interreta revuo senpaga, en formato A5. Al ĝi povas kontribui ĉiu persono pri preskaŭ ia ajn temo. Do sendu ankaŭ vian artikolon/komenton/poeziaĵon/historiaĵon/rakonton… Sendu al :

www.mirmekobo@mac.com

Io pri amo

de Jadranka Mirić (Serbio)

Ĉiu urbo aŭ vilaĝo havas siajn famajn eĉ favoratajn rakontojn pri grandaj amemuloj. Ĉiuj amoj estas similaj tamen la rakontoj varias.

Jen la unua rakonto

En Serbio (dua duono de la 18a jarcento kaj komenco de la 19a jarcento) estas fama rakonto pri pasia amo inter la serba famulo, poeto Lazar Kostić (1841-1910) kaj fraŭlino Jelena Lenka Dunđerski [Dunĝerski].

Jelena (mallonge Lenka) estis filino de tiea plej riĉa bienulo kaj granda bonfaranto. Ŝi estis bonedukita fraulino, konis kelkajn fremdajn lingvojn, ludis pianon kaj pentris. Ŝi estis edukita en, tiutempe, du grandaj edukcentroj Vieno kaj Peŝto. Ŝiaj interparoladoj kun la poeto, pri la senco de la vivo, pri Dio, universo, mistiko, eterno, estis tre interesaj kaj pensigaj. Fakte, ŝi estis sonĝo kiun transformis per vortoj Laza Kostić en sian "Santa Maria della Salute":

Al sonĝ' ŝi venis. Ne kiam vokis
Pro dezirego bolanta ard'.
Venis ŝi tiam, kiam ŝi volis,
Servas misteroj al ŝia grand',
Eterna povo ĉe ŝi sin lokis,
De teraj ĝuoj ĉiela frand',
Al ŝi nun sternas la vojon bunte
Santa Maria della Salute....

Ŝi estis lia iluzio, aŭ platona amo, nura revo dum solecaj tagoj, kaj poemoj nesurpaperigitaj estos infanoj liaj, de la renkontiĝoj nur eterna spuro pri radio traskuinta lian animon.

La poeto estis en la stato de revo kaj realo, ie inter. Jen liaj versoj klarigas tion:

Koro mia kor' soleca,
Ĉe mi enas vi kial?
Vi senlaca plektistino
Plektas plekton vi sen fino
Inter revo kaj real'…

Ke li restis fidela al sia edzino montras la poemo "Ni amas nin", verkita kiam li estis pli aĝa:

Ni amas nin, kara, ĉu ne?
Ĉu pro nigra forto
Aŭ kaŭze de la sorto

Disa estas nia par'?
Nigra fonto atakis ja
Al nigra pupil' via
Kaj nigra via harar'?'

Nuntempe, fama serba literaturisto kreis libreton por opero "Lenka" kaj la Serba Popola Teatro en Novi Sad (Vojvodina, Serbio) preparis la verkon; Miroslav Statkić komponis la operon.

La dua rakonto estis dediĉita al la serba poeto Vojislav Ilić Mlađi (La Pli Juna).

Li naskiĝis en 1878 kaj mortis 1944. Li estis tre klera, parolis la rusan, francan kaj germanan lingvojn. Li studis juron, kaj dungiĝis kiel oficisto laborante en kelkaj juĝejoj. Lia literatura kariero komenciĝis bele. Liaj verkoj aperis en gazetoj, revuoj, libroforme. La plej ŝatata en lia verkaro estis poezio, kiu temis ĉefe pri patriotismo, amo, intime travivitaj okazintaĵoj esprimitaj belege per fluaj versoj kaj bela ritmo.

Lia juna edzino estis instruistino kiu instruis en la vilaĝa lernejo en Krivi Vir troviĝanta apud fonto de la rivero Nigra Timoko. Li oficadis en la urbo Jagodina kiel polic-protokolisto. Malcerta kaj ĵaluza en sia amo, pro la vilaĝa klaĉado, iun matenon subite freneziĝinte li mortigis sian edzinon.

La poeto eternigis sian malfeliĉan amon per poemoj "Noćna svirka" ["Nokta muzikludo"], "Iz jedne šetnje" ["El unu promenado"] kaj "Zvoni" ["Sonorilas"]. La menciitaj ampoemoj kronologie montras disvolviĝon de liaj ardaj emocioj, pasioj, ĵaluzoj, streĉeco kaj fine subita malfeliĉa momento kaj mortigo de amata edzino.

Ho, kie vi estas! tempo belfeliĉa,
Kiam ni — ĝuante la ridon infanan —
Iris riverborde tra florar' dediĉa,
En ravinoj plukis floron diafanan.

Kie karmomentoj foriĝis malgajne,
Kiam ni promene en arbar' aprilis —
Unu la alian ni perdis laŭŝajne
Kaj nin retrovinte, ĝojkrie jubilis!…

Sed feliĉon, amon ĉiutage subfosis ĵaluzo, kaj duboj arde pikis la animon, la doloro iĝis infero.

Kie foras tagoj kiam dum promenado la silkan rubandon sur talio

ŝia ligis mi, aŭ kiam mi admiris al ŝiaj perle blankaj dentoj, kiam ĉiu floro odortostis kaj ĉiu najtingalo pepis pri niaj amsentoj?

Sed la doloro infera estiĝas la fonto de plezuro kaj feliĉo. Kaj ĉio okazis subite. Kaj la suno ardis dum valoj dormetis. Aŭdeblis la melodio grila kiam ĝendarmo la ĉapon demetis estime.

"Kion vi auskultas?" demandis la poeto time. La ĝendarmo flustris nur: "Sonorilas …. Oni ŝin forportas...!"

La poeto kuŝanta mortece atendis la ĉaron por forpreni lin al malliberejo.

Jen la lasta verso el lia poemo "Sonorilas"

Koĉer' la ĉevalojn per vipsiblo pelis,
Ŝvitantaj ĉevaloj pro galop' anhelis.
Ĝendarmoj silentas, silenton favoras,
Sed io, ie, sonoras … sonoras…

Tiel finis la granda amo kiun mortigis pli granda ĵaluzo.

Epilogo: Ili havis filon, kaj onidire li estis ebriulo kaj pro tio frue mortis. Li ordonis ke oni enskribu sur lia tombo la sekvajn vortojn: "Ĉi tie kuŝas la filo de murdinto kaj de pekulino".



Quokka (*Setonix brachyurus*)

Ĉi tiu marsupiulo grandas pli-malpli kiel domkato, kaj troveblas ĉefe 0sur Insulo Rottnest (proksime al Perth, en Aŭstralio), kaj dise sur kelkaj aliaj malgrandaj insuloj en Okcidenta Aŭstralio. Ĝi estas leĝe protektata besto.

La lasta diino

de Carmel Mallia (Malto)

Mi estis ankoraŭ infano. Aŭtoj maloftis tiutempe, kiam infanoj ĝojis kuri kaj galopi pli ol ĉevaloj, inkluzive min.

Mi ankoraŭ memoras, ke iun tagon, apudpasante pastron — tiutempe oni renkontis pli da pastroj ol hodiaŭ — mi aŭdis lin flustri al kunparolanto tri latinajn vortojn, sed mi aŭdetis nur du el ili, nome, '*ultima dea*' (la lasta diino). Tio verŝajne ne interesis min tiuaĝe kaj mi daŭrigis kuri kun la celo plenumi la ordonon de mia patrino, nome aĉeti viandon. Ridinde, sed ho ve, la viando ne plaĉis al mia patrino kaj mi devis reiri al la viando-vendejo por anstataŭigi ĝin. Sed tio estas alia historio.

Kiam mi maturiĝis, la studado rememorigis min pri tiuj du vortoj aŭditaj infanaĝe el la buŝo de tiu pastro. Tamen ĉifoje mi lernis plian vorton, fakte la antaŭan al tiuj du, ĝis mi lernis la tri vortojn: '*spes ultima dea*' (la espero estas la lasta diino).

La lasta diino! Do kiom da dioj ekzistas? mi murmuris al mi mem. Tamen mi sentis, ke facilas tion ekspliki, nome laŭ onies kompreno de 'dio'. Ĉio en la mondo povas esti dio, t.e. ni rigardas ĉion laŭ nia intereso en ĝi. Nu laŭ la Biblio, nur unu Dio ekzistas (kun majuskla D), kvankam laŭ la romianoj, kaj laŭtradicie, unu el la dioj (kun minuskla d) estas "Espero".

Ĉiu homo sentas, ke li vivas ĉiam esperante. La plej ekstremaj kazoj estas malsanulo kaj mortanto. Ĉar kiam oni malsanas, oni esperas je saniĝo, kaj tiel...ĝis la morto. En ambaŭ kazoj, ĉe la fino oni ne bezonas plu esperon, oni ne plu petas ĝin, oni ne plu atendas ĝian efikon, ĉar ĝi estas jam mortinta: *ultima dea* (la lasta diino).

Mi kredas, ke la du naziaj politikistoj Goebbels kaj Göring, la servutuloj de Hitlero en la lasta mondmilito, ege fervoris al diino-espero. Sed Hitlero sekrete perfidis ilin tiel ke kiam ili troviĝis antaŭ nepenetrebla muro, ili fine ambaŭ sin mortigis. Tiel, la esperon ili en si mem mortigis antaŭ ol ĝi eble povis ilin alhelpi.

Ĉi tie permesu al mi entrudi alian gravan vorton: fidon. Mi skribas ĝin minuskle kaj prave por ne miksi ĝin kun tiu majuskla, nome la religia Fido. Kiam oni esperas, oni fidas ion, t.e. oni kredas, ke io alhelpos vin, tiel vin ĝojigante. Tamen iusence ambaŭ fidoj similas.

Søren Kierkegaard kredas, ke la Fido (kun majuskla F) estas nenio alia ol salto tra miloj da kilometroj de maro. Tio signifas, ke li sin ĵetis kun fermitaj okuloj kredante je Dio. Sed ĉu la alia fido, t.e espero, ne similas al ĝi? Ĉu tiam

oni ne sin ĵetas en akvon senpripense esperante akiri ion pli bonan en futuro?

Mi ĵus menciis Hitleron. Bone. Li memorigas min pri Pampero, tiu ventego balaanta la Pampas, t.e. la verdecan etendaĵon de Urugvajo. La potenco de tiu vento trans la atlantika marbordo estas konsiderata kiel timiga. Nu ambaŭ Fido kaj fido similas al Pampero, galopanta ĉevalo, nenion timanta ĉar tiu kiu ilin brakumas scias, kiom necesas esperi por esti kontenta. Jes, per grandaj oferoj kaj per responsoj preskaŭ neelteneblej, sed kun malkvietiga firmeco, kondiĉe ke oni esperu (*spes*) ke fine (*ultima dea*) kion vi deziras, vi akiros. Kaj ĉar ĉi tiu dio (kun minuskla d) ne multe helpas, ni uzetas ĝin ne vivante sen ĝi.

La muzikisto Mahler en la enkonduko al sia dua simfonio demandis, per notoj kompreneble — ĉar eĉ muzikistoj faras demandojn per siaj notoj — ĉu li povus eskapi el morto. Li esperis... kvankam li subkonscie certis, kiel ĉiuj, ke fine la ĉevalŝuoj jam tretas ĉi tiun teron kun malsanecaj plat-ŝtonoj en strato kondukanta al nekonata ie.

Tamen la homo ĉiam timemas. En angla medicin-etika revuo oni antaŭ nelonge skribis ke iuj nekredantaj kuracistoj aŭdacas ĉesigi antaŭtempe la vivon de mortantoj, aldonante morfino-dozon. Sciante tion, kuracisto rimarkis, ke, se li estus ĉe la fino de sia vivo, li dezirus scii, kiun religion konfesas specialisto lin kuracanta, pri la influo kiun la religio povus havi en lia decido. Tiel, laŭ li, nekredanta kuracisto ne devas permesi, ke lia kredo influu liajn decidojn.

Spes ultima dea (*Espero: la lasta diino*). Tiel kredis la romianoj. Tiel ek de ĉiam kredis la homaro. Ĉar tiel ja estas.



Bilby (*Macrotis lagotis*) rara marsupiulo aŭstralia — ofte proponata kiel anstataŭo por la tradicia kuniklo en paskaj festoj.

ironiaĵo

Letero al s-ro Ludoviko Zamenhof

de Ludoviko

Estimata sinjoro,

Oni diras ke vi volas krei lingvon. Mi skribas al vi ĝuste por tio, ke vi haltigu vin en tia sensenca intenco. Nu, mi devas klarigi mian vidpunkton. Mi ne kredas tion, tio estas, mi ne kredas pri la ebleco krei lingvon. Atentu. Lingvo estas popola afero ne individua. Se iu izole kreus lingvon ĝi estus tute senkultura, kaj lingvo sen kulturo estus lingvo sen animo, pro tio tute ne taŭga por komuniki pensojn kaj sentojn. Kiel, per via artefarota lingvo, vi povus diri ion similan al:

"Nu, Ariadne, ĉu la modomastron ni fadene pinglos en Panamo?
Siren-logite li ĵus el Havano edzecon fuĝis kiel fidel-kastron."

(Henri Vatré)

Kompreneble, vi neniam sukcesus, per via artefarota lingvo, miksi politikon kun fideleco kaj kastreco. Eĉ ne modmastron kun greka mitologio kaj ĉion — kun Panamo, Havano, ktp. Kial? Ĉar vi ne kreus veran lingvon, vi fakte nur kreus kodon! Lingvo kunportas konotaciojn, humuron, kodo — ne. Jen, do!

Estimata sinjoro, ne perdu vian tempon pri utopioj. Mi aŭdis pri vi, ke vi estas okulkuracisto. Mi instigas vin uzi vian fakecon por plibonigi la homaran kapablon vidi la ĉirkaŭantan mondon, anstataŭ malŝpari strebojn klopodante krei utopian mondon.

Kredu min amiko via

Ludoviko



Suda Marsupiula Talpo (*Notoryctes typhlops)* entera besto de okcidentaŭstraliaj dezertoj.

historio de la scienco

Geometrio kaj sfera astronomio en la unua greka kosmologio.[1]

de Marcel Lemeltier

PARTO 1

La problemo kiun mi intencas pritrakti koncernas malpli la historion de la ekzakte scienca penso, ol la rilatojn inter iaj bazaj sciencaj nocioj — ia mondobildo — kaj faktojn pri socia historio.

Komence de la 6a jarcentoAKE, la astronomia penso en Helaso ankoraŭ ne baziĝis sur longa daŭro de observadoj kaj eksperimentoj; ĝi ne apogiĝis sur scienca starigita tradicio.

Se mi devus ekspliki kiel malkovro estis farita dum la 18a aŭ la 20a jarcentoKE, mi devus precipe min turni al la tiama disvolviĝo de la scienco mem, al la stato de la teorioj kaj teknikoj, fine al la interna dinamiko de la esploradoj en tia aŭ alia scienca disciplino.

Sed, en arkaika Helaso, nenia jam starigita scienco ekzistis. La kelkaj astronomiaj konoj, kiujn la Ionianoj prilaboros, ne estis ja ia eltrovo fare de tiuj helenoj. Ili estis pruntitaj el la najbaraj civilizoj de la Proksima Oriento, nome la babilonia. Do ni estas antaŭ jena paradokso: la helenoj estas fondontaj kosmologion kaj astronomion. Ili estas donontaj al ili orientadon kiu estas decidonta, dum la tuta historio de la Okcidento, la sorton de tiuj disciplinoj. Ekde la komenco, ili estas donontaj la direkton, kiun ni hodiaŭ ankoraŭ sekvas.

Kaj tamen, ne ili sin dediĉis de jarcentoj al detalema laboro por observi la astrojn; ne ili notis sur tabelojn, laŭ la maniero de la babilonianoj, kalendarojn signalante la diversajn lunfazojn, la leviĝantajn kaj subirantajn stelojn en la ĉielo. Do, la grekoj uzis observojn, teknikojn kaj ilojn, kiujn aliaj estis finpretigintaj.

Tamen, ili integris la konojn tiel transdonitajn en tute novan sistemon. Ili fondis novan astronomion. Kiel espliki tiun novaĵon? Kial la helenoj metis la depruntajn el aliaj popoloj konojn en novan kaj originalan kadron? Tia estas la problemo, kiun mi hodiaŭ volus pripensi.

La babilonia astronomio, tre disvolviĝinta, havis entute tri karakterojn:

---

[1] En la verko de Platono, *La Respubliko* [verkita ĉ. 380AKE], en Libro 7, Sokrato kaj lia frato Glaŭkono diskutas la fakton ke ankoraŭ neniu studanto de astronomio ekzamenis la geometrian aspekton de sferoj.—Red.

Ĝi estas integrita al astra religio. Se la babiloniaj astronomoj zorge observadis la astron kiun ni nomas Venuso, por ili temis pri grava dio: Iŝtaro. Ili estis certaj ke laŭ la pozicioj de Venuso la homa sorto turniĝos en unu aŭ alia direkto. Al iliaj okuloj la ĉiela mondo reprezentis diajn potencojn. Ĝin observante, la homoj povas diveni la diajn intencojn.

Tiuj, kiuj rolis kiel astroobservantoj apartenis al la skribista klaso. En la babilonia socio la skribistoj havis la funkcion skribe konservi en arkivaj formoj ĉiujn detalojn pri la ekonomika vivo. Oni povas diri, ke ili librotenadis tion, kio okazas en la ĉielo same kiel ili faris pri la homa socio. En ambaŭ kazoj, la skribistoj agas je la servo de la persono, kiu superas la tutan babilonian socion: la reĝo, ĉar estas necese por la reĝo scii tion, kio okazas en la ĉielo. Lia persona destino kaj la savo de la reĝlando rilatas al tio. Peranto inter la ĉiela kaj la tera mondoj, li devas ekzakte scii en kiu momento necesas plenumi la religiajn ritojn, pri kiuj li respondecas. La astronomio estas do ligita al la prilaborado de religia kalendaro, kies finpretigo estas la privelegio de skribistoj laborantaj je la reĝa servo.

Tiu ĉi astronomio havas strikte aritmetikan karakteron. La babilonianoj, kiuj havis precizan konon de iuj ĉielaj fenomenoj, kiuj povis empirie antaŭvidi eklipson, ne bildigis al si la ĉielajn movojn laŭ geometria modelo. Ili kontentiĝis noti sur siaj tabeloj la sinsekvajn poziciojn de la astroj, tenis ilian ekzaktan kontrolon. Tiel ili starigis aritmetikajn receptojn, ebligante antaŭdiri ĉu specifa astro aperos en specifa momento de la jaro. Ĉe ili do, astronomio ne estis projekciita en spacan skemon.

Pri tiuj tri punktoj la greka astronomio de la komenco estis radikala rompo. Unue, ĝi aperis libera de ĉia astra religio. La ioniaj "fizikistoj"— Taleso, Anaksimandro, Anaksimeno — prezentis en siaj kosmologiaj verkoj, "*teoria*"[1], vidmanieron, ĝeneralan koncepton, kiu faros la mondon eksplikebla sen ia referenco al dioj aŭ ritaj praktikadoj. Male, la "fizikistoj" konsciis ke ili en multaj punktoj konstraŭstaras tradiciajn religiajn kredaĵojn.

Do, ni trovas antaŭ ni sciadon kiu tuj alligas sin al idealo de komprenebleco. La ionianoj tiukampe montris eksterordinaran aŭdacon. Ili celis al tio, ke ĉiu homo povu kompreni, per simplaj ekzemploj ofte eltiritaj el la ĉiutaga vivo kaj el la plej familiaraj praktikadoj, kiel la mondo origine formiĝis. Ekzemple, ili esplikis la mondformadon per la bildo de kribrilo kiun oni skuas, aŭ per tiu de kota akvo kiu kirliĝas en ujo: la plej pezaj partoj koncentriĝas, la plej malpezaj direktiĝas al la periferio. Ili penis pravigi la aranĝon de la universo nur per pozitiva kaj racia maniero.

Tiusence, la mondobildo kiun proponis la unuaj "fizikistoj" de Ionio

1 Greka vorto signifanta vidmanieron, ĝeneralan koncepton.

aspektas tute malsimila je tiu kiu antaŭe ekzistis, ekzemple ĉe Homero aŭ Hesiodo. Kompare kun la antikva kompreno, la arkaika mondobildo, la skemo de Anaksimandro estas ja bone liberigita. Vi vidos ke temas pri ŝanĝo eĉ en la prispaca reprezentado. Por komprenigi tion, kion mi volas diri, mi prenos pli kutiman ekzemplon, ĉar pli freŝan. Dum jarcentoj, dum la tuta mezepoko post la antikveco, la homoj vivis opiniante, ke la tero senmove kuŝis meze de la universo. Oni ja scias kian intelektan revolucion okazigis la forlaso de tiu kompreno por la heliocentra teorio: la tero ne plu estis senmova, ĝi ne estis meze de la kosmo, la mondo ne estis farita por homo kreita laŭ la Diobildo. Tiu nova kompreno de la spaco kaŭzis veran transformiĝon de la ideo, al kiu la homo estis kutimiĝinta pri si mem kaj pri siaj rilatoj al la mondo.

La intelekta revolucio pri kiu mi estas parolonta ne estas malpli radikala. En la opinio de Homero kaj Hesiodo, la tero estas preskaŭ ebena disko ĉirkaŭita de cirkla rivero, Oceano, sen origino kaj sen fino, ĉar Oceano sin ĵetas en sin mem. Tie, oni retrovas temon kiu jam aperis ĉe la babilonianoj, en tiuj grandaj riveraj ŝtatoj kie la kulturitaj teroj estis penige akiritaj dank' al digaj kaj duktaj sistemoj. Tial la monda genezo kaj la aranĝo estas komprenataj kiel elsekiĝo de la tero, kiu iom post iom apartiĝis de la ĉirkaŭantaj akvoj.

Supre de la tero, kiel renversiĝinta bovlo kuŝanta sur oceana ĉirkaŭo, altiĝas bronza firmamento. Ĝi estas tiel nomata por esprimi ĝian nedifekteblan solidecon: regiono por la dioj, la ĉielo estas nedetruebla.

Malsupre de la tero, kio estas? Por la antikva heleno estas unue tio, sur kio oni povas tute memfide paŝi, ne riskante fali, solida kaj sekura sidejo. Tial oni imagis sub ĝi radikojn, kiuj garantias ĝian stabilecon. Kien iras la radikoj? Oni ne scias ekzakte. Ili senfine, senlime enradikiĝas, diris Ksenofano; la ĉefaĵo estas ke oni estu certa ke la tero ne povas moviĝi.

Anstataŭ senfine malsuprenirantaj radikoj, laŭ Hesiodo oni povas imagi grandegan ĵaron finiĝantan per mallarĝa kolo el kiu ekaperas la mondradikoj. En la ĵaro turnoventoj blovas ĉiudirekten: tio estas la mondo de la malordo, de ankoraŭ ne direktita spaco. La kosmogonioj precize rakontas kiel Zeŭso, fariĝinte reĝo de la universo, por ĉiam bukis la ĵarkolon. Li por ĉiam sigelis la aperturon por ke la subtera mondo de la malordo — la mondo kie ĉiuj spacodirektoj estas miksitaj en nemalimplikebla ĥaoso, en mikskonfuzo de supro kaj malsupro, de dekstro kaj maldekstro — tiel ke tiu ĉi mondo ne plu povu emerĝi al la lumo.

Kial ĵaro en tiu mita bildo de la kosmo? Ĉar la praavoj de la grekoj enfosigis en la grundon de siaj provizejoj grandajn ĵarojn entenantajn la terofruktojn kaj ankaŭ la kadavrojn de la hejmaj forpasintoj: la subtera mondo, kiun la ĵaro simbolas, estas tiu, el kiu supren strebas la plantoj, kie ĝermas la semoj, kie

restadas la forpasintoj.

Tio, kio karakterizas la mitan bildon, kiun mi ĵus priskribis, estas ke ĝi reprezentas universon je tri niveloj. La supra spaco estas tute diferenca de la meza kaj de la malsupra. La unua estas por Zeŭso kaj la senmortaj dioj, la dua por la homoj, la tria por la morto kaj la subteraj dioj. Etaĝa mondo kie, krom pro specialaj kondiĉoj, oni ne povas transiri el unu etaĝo al alia. Sammaniere, sur tiu tero la spacaj direktoj estas malsimilaj: la dekstra estas favora, la maldekstra malfavora. Oriento kaj okcidento havas religiajn kvalitojn kiuj ne estas samaj.

Komparu tiun malnovan mitan bildon kun tiu, kiun ni trovas ĉe Anaksimandro. Por tiu, la tero estas trunkita kolono, kiu situas meze de la kosmo. Kaj jen kiel li eksplikas ke la tero povas resti senmova. Li elmontras, ke la tero ne falas, ĉar ĝi estas je egala distanco de ĉiuj punktoj de la ĉiela periferio; ĝi ne havas ian ajn kaŭzon por iri dekstren- maldekstren, supren-malsupren. Ni jam havas sferan konceptadon. Ni vidas la naskiĝon de nova spaco, kiu ne plu estas mita kun radikoj aŭ ĵaroj, sed spaco tipe geometria. Temas ja pri spaco ĉefe difinita per rilatoj de distanco kaj pozicio, spaco kiu ebligas fondi la terostabilecon sur geometria difino de la centro en siaj rilatoj kun la periferio.

Alia teksto, kiun la doksografio[1] atribuas al Anaksimandro, bone elmontras ke ĉe li aperas la konscio pri la inversigebla karaktero de ĉiuj spacaj rilatoj. Ni ne plu estas en mita spaco kie supro-malsupro, dekstro-maldekstro havas religiajn malajn signifojn, sed en homogena spaco konstituita de simetriaj kaj inversigeblaj rilatoj. En tiu teksto, Anaksimandro konsentas pri la ekzisto de la "antipodoj". Kaj oni rajtas pensi, laŭ iuj dokumentoj de la hipokrata kolektado, ke, por Anaksimandro, tio, kio aperas al ni supro, estas por la antipodanoj malsupro; tio, kio estas nia dekstro, estas por ili maldekstro. Alidire, la spacaj direktoj ne plu havas absolutan valoron. La spacostrukturo, en kies mezo kuŝas la tero, estas de vere matematika tipo.

Kiel konsideri tiun turnopunkton en la astronomia penso, tiun intelektan subitan ŝanĝon? Unu el la plej bonaj specialistoj pri la antikva astronomio povis skribi: "la babilonia astronomio estas pure aritmetika, dum la greka kosmologio estas ekde la komenco geometria… La sola klarigo, kiun mi povas trovi por tiu fenomeno, estas ke la grekoj estis denaskaj geometroj."

Klarigo sufiĉe kurta. Mi volus proponi alian. Inter la Hesioda kaj la Anaksimandra epokoj okazis tuta serio de jen sociaj, jen ekonomikaj transformoj, kies gravecon oni ofte substrekis. Miaflanke, mi volus emfazi la punkton, kiun mi konsideras kiel ĉefan por la preciza kompreno de la

[1] Doksografio = atribuo de vidpunkto al historie antaŭa persono.

turnopunkto kiun ni estas eksplikontaj. Laŭ mi, temas pri politika fenomeno, nome la alveno de la "*polis*"[1] helena.

Ĉar ni serĉas pravigi ian astronomian konceptadon de la universo, ni estas antaŭ pensomaniero, kiu lokiĝas en la nivelo de la pripensita konscio, de la ellaborita pripensado. Tiu pensado sin esprimas per difinita vortotrezoro, ĝi sin organizas ĉirkaŭ iuj fundamentaj nocioj; ĝi sin prezentas kiel koncepta sistemo kohera kaj strukturita. Tiu vortotrezoro, tiuj bazaj nocioj, tiu koncepta sistemo estas novaj rilate al la pasinteco. Por kompreni kiel ili povis estiĝi, ni devas serĉi sub kiaj formoj la sociaj ŝanĝoj mem esprimiĝis je la koncepta nivelo. Alidire, ni devas serĉi kiu estas la sektoro de la la socia vivo kiu estis uzata kiel interhelpanto, kiu ludis mediacirolon rilate al konstruado de la penso, al la renoviĝo de iaj superstrukturoj.

Por trovi tiun mediaciantan ĉeneron inter la socia praktikado de la helenoj kaj ilia intelekta mondo, estas necese serĉadi kiel la greka homo de la VIIa jarcento antaŭ nia erao, antaŭ la krizo provokita per la disvolviĝo de la mara komerco kaj la komencoj de mona ekonomio, estis kondukita al repensado de sia socia vivo por provi ĝin remodeligi konforme al iaj egalrajtaj aspiradoj, kiel tiamaniere li faris de tiu repensado pripensan objekton, kiel li ĝin konceptis. Tiel, ni komparos realaĵojn, kiuj estas efektive kompareblaj, homogenaj; ni ekrilatigos por substreki ilian eventualan kongruecon, iliajn strukturajn homologion, du mensajn sistemojn; ĉiu el ili havas sian vortotrezoron, siajn bazajn konceptojn, sian intelektan kadron — unu el tiuj sistemoj estis ellaborita en la socia praktiko, la alia aplikiĝas al la kono de la naturo.

Pri tiu preciza vidpunkto, Grekio prezentas rimarkindan fenomenon, oni eĉ povus diri eksterordinaran. Por la unua fojo en la homa historio, laŭŝajne, liberiĝas plano de socia vivo, kiu rezultas el interkonsentita serĉado, el konscia pripensado. La institucioj de la civito implicas ne nur la ekzistadon de politika sfero, sed ankaŭ politikan pensadon. La esprimo kiu signifas la politikan sferon: τα κοινα = tio komuna al ĉiuj, la publikaj aferoj. Ĉar estas por la heleno, en la homa vivo, du bone apartigitaj sferoj: sfero privata, familia, hejma (tio, kion la helenoj nomas ekonomion: οικονομια [*oikonomia*]), kaj publika sfero kiu entenas ĉiujn decidojn de komuna intereso, tio kio faras el la kolektivaĵo unuigitan kaj solidaran grupon, πολις [*polis*].

(Parto 2 aperos en Mirmekobo 16)

---

[1] Sendependa respublika civito.

religia poemo

Indiana preĝo

tradicia; traduko: Massimo Speltoni

Ho Granda Spirito,
kies voĉon mi aŭdas en la vento
aŭskultu min! Mi estas eta kaj febla
mi bezonas viajn forton kaj saĝon.
Ke mi paŝu en la beleco kaj ke miaj okuloj ĉiam kontemplu
la ruĝan kaj violkoloran sunsubiron.

Ke miaj manoj respektu la aĵojn kiujn vi kreis,
kaj ke miaj oreloj priatentu vian voĉon.
Saĝigu min por ke mi komprenu la aĵojn kiujn vi lernigis al mia popolo.
Ke mi lernu la lecionon kiun vi kaŝis en ĉiu folio kaj ŝtono.
Mi serĉas forton, ne por esti pli granda ol mia frato,
sed por batali mian plej grandan malamikon: min mem.
Ke mi estu ĉiam preta veni ĉe vi kun puraj manoj
kaj rektaj okuloj.
Por ke kiam la vivo febliĝas kiel la suno en sia krepusko,
mia spirito venu ĉe vi sen honto.



Nigra Kakatuo Carneby

Ĉi tiu papaga specio troveblas nur en sudokcidenta Aŭstralio. Restas nur malmultaj individuoj.

humuro

Serio de parodioj en la stilo de famaj rusaj poetoj je infana popola kanteto "griza kapreto"

de Tatjana Auderskaja

Kvazaŭ ruĝa fadeno trairas la mondan literaturon korŝira historio pri la griza kapreto.

La originalo:

Vivis ĉe olda dam' griza kapreto,
Du-tri, du-tri, griza kapreto. (2 foje)

Amis treege lin kara avino,
Du-tri, du-tri, bona avino. (2 foje)

Foje forkuris li al la arbaro,
Du-tri, du-tri, nigra arbaro. (2 foje)

Tie formanĝis lin griza luparo,
Du-tri, du-tri, kruela luparo. (2 foje)

Kaj restis por la avin' hufoj kaj kornoj,
Jen do, jen do, hufoj kaj kornoj. (2 foje)

Lia tragika sorto dum longaj jaroj elvokis la inspiron de multaj eminentaj aŭtoroj.

Jen kiel rakontus la saman historion rusa ekstravaganta poeto-modernisto Igor Severjanin:

Oldulin'-sorĉistino
Pro la ama inklino
Flirtis en reva sento kiel kordo en vent'.
Kapro juna kaj griza
Kun ĉarmeco Pariza
Ludis skercon amoran por animo en tent'.

Sur herbejo aĵura
Ortagmezo purpura.
Tiel lace-langvore gapas li al arbar'...
Kiel bone sen vorto
Sin fordoni al sorto
Kaj atendi surprizon en silento, sen far'.

Ho, adori la lupon,
El si fari la supon
Por plenigi la beston per ekstaza pasi'.
Kaj al la sorĉistino
Kun sinistra inklino
Imponante donaci ŝikan kornon de si!

Kaj jen tute alia poeto, tenera kaj langvora Aleksandr Vertinskij:

Kien foriris vi, ho griza, ho kapreto,
Kun sonoril' sur kol', rubando sur la korn'?
Sopiras la ĝarden', kaj ploras virineto
Pro la mortinta am', kaj pro venonta morn'.

En lasta trista hor' mi vidis vin proksime,
Al nigrarbar' vi strebis en kabriolet',
Kaj poste falis vi sub lupa pez' senlime,
Lasinte kornojn nur al povra virinet'.

Jen kruda kaj morne ironia Saŝa Ĉornij:

Ŝiris harojn pro griza kaprac' oldulino...
(Ploru, ploru, formanĝu vin lupoj!).
Ŝi lamentis pro sia severa destino
Kaj karesis (tfu!) kornajn hufojn.

Kial preterrigardis vi, kap' sen cerbo?
Ja forkuris via trezoro.
Kaj kuŝas en arbaro sur herbo
Ostoj de kapro, kiu kredis je boneco de lupa moro.

Amegis, fordonis la lastan paneron,
Sed lupoj — ne kokinoj!
Ili lasis al avino sur sanga tero
Por ŝi lasis (*tfu!*) nur kornoj kaj hufoj. Jen fino.

Al sekva paĝo!

Jen ĉiam aktuala Eŭgenij Evtuŝenko:

Jen kio en la viv' okazis:
La kapro griza min forlasis,
Sed vizitadas min en van'
La vulpo rufa, verda ran'...

La kapro mia kun aliuj
Vagadas en arbar', ne tiuj
Kiujn bezonas li en kor'.
Ni ambaŭ ploras en la ĥor'.

La lupo per brakum' tenera
Lin logis al arbar' danĝera,
Kaj mi en malespera sent'
Brakumas triste kun serpent'...

Jen restis hufoj nur kaj kornoj
De mia am' por tagoj mornaj.
Ho IU! Venu por alvok',
Min savu de l' fremdul' minaca
Kaj kun anim' de l' kapro paca
Min ligu en beata lok'.

Jen profundsenta Andrej Voznesenskij:

En aŭroro mi vekos la kapron,
Li foriros al nigra arbaro,
Kaj sopire mi klinos la kapon, -
Dio nin ne kunigis en paro.

Mi senŝua al sojlo foriros
Lastrigardi al griza, kornhava.
"Bonan vojon" al li mi deziros,
Kvankam ĉeas jam son' de malsavo.

Du ĉerizoj enlarme dronintaj –
Kuŝas kornoj kaj hufoj sur herbo.
Mi sur ter' vin revidos neniam,
Sed pri vi ne forgesos la cerbo!

al sekva paĝo!

Kaj jen patosa ROBERT ROXDESTVENSKIJ:

Tio estis. Forgesis – kiam.
Nure gravas, ke okazis.
Kapron oni forŝtelis mian
Dum mi propran vizaĝon razis.

Mi animon disŝiris floke,
Mi ne kredas al mens' klara:
Al densej' de l' arbar' loka
Forlogita kapret' kara.

Griza lupo, muzel' turpa,
Lin devoris kun ĝu' mava.
Jen ĉi tiel okazis murdo,
Ĉar forestis la man' sava.

Pendas Lun' kiel lupa dento,
En horor' mi entiras kapon.
Ĉu en la trideka jarcento
Lupoj ankaŭ mortigos kaprojn?!

---

mito

La mito pri Narciso

laŭ la romiana poeto Ovidio

Narciso estis junulo nekredeble bela. Dum li promenis en arbaro, la nimfo Eĥo vidis lin, ekamegis lin, kaj volis pro sia ardanta pasio amori lin. Ŝi komencis lin kaŝe sekvi. Konsciiĝinte pri ŝia ĉeesto, li vokis: "Venu ĉi tien!"

Eĥo jam estis kondamnita neniam paroli la unua, sed nur respondi kiam alia ulo parolis, kaj ripeti ties vortojn. Do Eĥo respondis al Nacisto: "Venu ĉi tien!" Eĥo sin montris al Narciso kaj provis ĉirkaŭbraki lin, sed li forpuŝis ŝin. Eĥo sin kaŝis en la arbaro kaj iom post iom ŝia korpo putriĝis tiel ke restis nur ŝia voĉo.

Narciso vidis sian spegulitan bildon en la akvo. Vidante tiel belan knabon en la akvo, li mem enamiĝis kun la bildo, kaj penegis ĉirkaŭbraki la enakvan bildon, sed ĉiam sensukcese. Li ne povis forrigardi, kaj fine li mortis. Sed en la loko de lia morto kreskis bela ora-kaj-blanka floro.

[Resumis la rakonton Donald Broadribb, el la multege pli longa teksto de Ovidio en lia verko *Metamorfozoj*.]

skribis leganto

Pri puntado

Skribis Françoise Noireau:

“Eble mi eraras sed iu artikolo [en *Mirmekobo 14*] kreas konfuzon :

Por mi “punto” (“dentelle”, en la franca) havas pli mallarĝan sencon kaj ne estas brodado (“broderie”), trikado (“tricot”) kaj kroĉado (“crochet”).

La uzataj iloj diferencigas tiujn 4 manlaborojn.”



Respondas la redaktoro:

NPIV difinas “punto” tiel: *Maldensa delikata plektaĵo el kotonaj, linaj aŭ silkaj fadenoj, kies maŝoj aranĝitaj laŭ metoda trikado, prezentas artajn desegnaĵojn, kaj kiun oni faras per diversaj iloj (hokstangetoj, trikiloj, puntobobenoj aŭ speciala maŝino.* Do temas pri ĝenerala termino kiu inkluzivas brodadon, trikadon kaj kroĉadon.

satiro

La Patrujamanto

de Tefi

Elrusigis Yenovk Lazian

Horis la sesa matene ĉe la fervojstacio Ĉudovo. Mi estis atendanta la rejungadon de ĉevaloj por veturi vilaĝen, trinkadis teon kaj enuiĝis.

La halo estis granda kaj aĉe prilumita. Ie transmure jelpe knaras kaj obtuze klakas pordoj. Ĉe la servotablo la dormidezira bufedisto sonorigas kuleretojn kaj tintigas tasojn. Li ĉiuminute rigardas horloĝen kaj oscedas kiel leono en kaĝo.

La enuo superas ĉioman mezuron!

Subite mi rimarkas ke ĉe la vid-al-vida tablo io ekmoviĝis. Aŭdiĝis ansereca kvakado, kaj de la sofo peze leviĝis dika razitvizaĝa maljunulo kun trikita ronda ĉapeto, simila al tiuj kiujn oni surmetas al novnaskitoj. Aldone al la ĉapeto li surhavis striitan lanan veŝton, grizetan jakon kaj rajdistajn botojn,.

La maljunulo vekfrotis la okulojn, gestovokis la serviston, montris al li rublon kaj nee skuinte la kapon, fingrofrapis la starantan surtable malplenan bierbotelon.

Tamen ankaŭ la servisto nee skuis la kapon kaj foriris. La maljunulo elpoŝigis grasmakulitan notlibreton kun disfalantaj paĝoj kaj gratskribis ion en ĝin.

--

“Kiu estas tiu homo?” demandis mi la serviston.

“Iu germano, sinjorino. Venis vespere piede, ekde tiam drinkadas ja la bieron, tamen ne pagas, nur montras tiun unu rublon kaj denove enŝovas poŝen. La sinjor’ bufedisto ordonis ne plu priservi.”

“Tamen vi certe ne komprenas, kion li parolas.”

“Via sinjorina moŝto pravas: ni ne komprenas.”

--

En la sama minuto la germano ekstaris kaj alpaŝinte min, pardonpetis pro io.

Mi eksciis do, ke li estas franco vojaĝanta piede tra la mondo. Li trapaŝis la tutan Afrikon, Amerikon, Aŭstralion kaj Eŭropon. Nun survojas al Azio tra Ruslando. Li forlasis la hejmon antaŭ kvar jaroj.

“Kiucele vi vagas? Kio naskis tian deziron?” miris mi.

“Je la gloro de mia patrujo. Pro la patrujamo.” Antaŭ kelkaj jaroj alia membro de nia rondo trairis la tutan mondon dum tri jaroj. Mi diris, ke mi

trairos pli rapide. Kaj jen mi survojas jam kvinan jaron, dume trairis nur la duonon. La samrondano do mensogis."

"Tamen li ankaŭ estis franco, do li jam glorigis la patrujon, ĉu ne? Ĉu necesas ripeti lian agon?"

"O! Madame juĝas iom supraĵe. Madame ne komprenas ke ĉiu franco volas propramane glorigi sian patrujon. Kaj rimarku ke mi vojaĝas senmone.

"Ĉu? Mi tamen vidis unu rublon en via mano."

"Jes ja, nur por komprenigi, ke mi ne havas monon. Mi montras la moneron, skuas la kapon, kaj tuj ĉio klaras."

"Malkutime. Tamen kiel vi pruvus ke vi vere trairadas kaj ne sidis ie ajn en Vierge-Beau-mi-ne-scias-kie?"

O madame! En ĉiuj grandaj urboj mi elpetas de la urbestroj atestilojn pri mia trapaso. Krome mi pluskribas mian taglibron, do miaj notoj estas eldonotaj je la gloro de mia patrujuo."

Li elpoŝigis sian grasmakulitan notlibreton kaj kun afable larĝa rideto montris al mi la lastan paĝon.

"Ĉi tie legeblas io pri via hejma landoparto. O! Mi preterlasas neniun detalon."

Mi eklegis la liniaĉojn: "La virinoj en la gubernio Ĉudovo havas plejparte blondan hararon kaj portas ledajn saketojn je surŝultra rimeno".

Mi kurigis kaŝetan rigardon tra la apuda paĝo. Sure franclitere legeblis la rusaj vortoj "bjero" kaj "manĝjo".

"O madame!" daŭrigis la franco, delikate forprenante la notlibron de mia mano. Mi povas montri al vi tiom da interesaĵoj! Mi montru al vi la leterojn de mia edzino kaj ŝian portreton."

Li ŝovis en mian manon faskon da ĉifitaj leteroj, sed taksinte tion nesufiĉa, eklegis voĉe unu el ili:

"Mia adorata amiko," skribis tiu elstara virino, "Marŝu antaŭen! Marŝu spite senaĵojn kaj la malfacilaĵojn de via vojo. Laboru pro la gloro de nia kara patrujo, kaj mi atendos vin dum longaj jaroj kaj partoprenos vian gloran agon per mia preĝo."

Poste li eligis etan fotografon, alrigardis ĝin dum kelkaj minutoj kun kortuŝita kapskuo kaj mallaŭte ekkantis:

"Et tra-là-là-là-là.
Et tra-là-là-là-là
Roulait dans du galà."

--

La kantaĵo ekŝajnis al mi strangeta, tamen vidinte la fotografion mi jam ne plu miris. Sur la foto videblis juna ino portanta bekĉapon kaj mallongan jupon.

Ŝi militsalutis onin... per la kruro.

"Via edzino estas verŝajne... kantistino," balbutis mi ne sciante kion diri.

"Kial vi opinias tiel?"

"Rigardante la vizaĝon oni konjektas ke ŝia voĉo belas," eltrovis mi la klarigon.

"Jes ja, vi pravas! Ŝi estas granda artistino! Ŝia nomo tondros en la tuta mondo. La granda Cocquelain proprabuŝe aŭguris radiantan gloron al ŝi. Kaj ŝi laboras... O, kiel ŝi laboras por nia patrujo! Kaj ŝi kuraĝigas min. Jen, en sia alia letero ŝi diras ke mi eĉ ne pensu reveni antaŭ la plenumo de la tasko. La kompatinda! Ŝi suferegas sen mi, tamen oferdonas ĉion *pour nôtre chère patrie*[1]. Ŝi estas sanktulino," aldonis li kaj alrigardis min gravmiene.

Ne sciante kion diri, mi demandis, ĉu li ŝatis Afrikon.

"O! *C'est de la chaleur!*[2]" Respondis li kaj senespere forgestis.

--

Mi estis jam suprenirtana en la poŝtkaleŝon, kiam la koĉero kunmetanta miajn pakaĵojn montris al mi ion permane, forturniĝis kaj ĉevalece ridronkis. Mi rigardis tiudirekten.

Sur glitiga kaj glueca pado laŭlonge de la fervojo paŝis la patrujamanto.

"Kompatindulo," pensis mi, "per kio rekompencos la sendanka patrujo vian glorigon, celante kiun vi knedas per viaj kruringoj nian provincan koton?"

Li ekvidis min defore kaj rapide alpaŝis kun strangaj salutgestoj.

Li longvorte bondeziris al mi ĉiajn feliĉaĵojn kaj je la fino mirsenspirigis min promesinte nepre perleteri miajn salutojn al sia edzino.

"Ŝi estas sanktulino," rediris li kaj forpaŝis mallaŭte kantante tion, kio verŝajne rektege pensigis pri ŝi:

"Et tra-là-là-là-là.
Et tra-là-là-là-là
Roulait dans du galà"

--



Teffi (vernome Nadeĵda Loĥvickaja) 1872 Sankt-Petersburgo — 1952 Parizo. Fama rusa verkistino, la unua humuristino de la 20a jarcento. Devenis el nobela altedukita familio. Ŝiaj fratinoj ankaŭ verkis. Ŝia unua poemlibro aperis en 1910, poste ŝi verkis ankaŭ prozon. Ŝiajn rakontojn ŝatis kaj la caro Nikolao II, kaj Vladimir Uljanov (pli konata kiel Lenin). Teffi sukcesis forlasi sian landon baldaŭ post la ekrego de la ruĝa diktatoro. Tamen eĉ post la elmigro ŝiaj verkoj pirate aperadis en Soveta Ruslando, ĉar al

[1] France: Por nia kara patrujo.

[2] France: Estas varmege.

Lenin plaĉis ŝia priskribo de la eksterlanda vivaĉo de la rusaj forfuĝintoj. La verkistino verve protestis kontraŭ tia misuzo kaj malobservo de la aŭtorrajto. Ŝia plumnomo havas amuzan devenon. Ŝi konis malsaĝan homon nomatan Steffi kaj kredante ke la malsaĝecon ĉiam akompanas bonŝanco, alprenis tiun antaŭnomon fortranĉinte — pro delikateco — la unuan literon.

---

poezio

La nigra muro

de Julio Szabo

Sur nigra muro nigraj bildoj pendas,
Ĉio estas nigra, kien mi rigardas.
Nigrante vekas min ĉiutaga aŭroro,
Estas jam senbrilaj steloj, luno, suno.


Se en nigra spaco fantomoj min ĝenas,
Helpante per menso muron mi trarompas,
Trans tiu ĉi truo mi vidas jam ĉion,
Ĝi ekmontras al mi multkoloran vivon.

Kirlanta amaso, batal', laborbruo,
Mil' da mil sopiroj de l' kreskanta vivo.
Kune kunprenas min, jen en ĝi mi vivas,
Tiam valoras ĝi, se oni kreadas.

Scienco kaj arto, laborema volo,
Estu ĉiam kun ni en granda batalo.
Lumigu la vojon, kie ni tramarŝos,
Tiel blinduloj jam inter ni ne estos.

Trans la nigra muro mi trovas vivbildon,
Mia koro havas pacon kaj trankvilon.
Tiel mi laboras, vivas sur la globo,
Nur tiel mi sentas, ke mi estas homo.

La Mirmekobo



Kiel besto, la Mirmekobo (*Myrmecobius fasciatus*) estas preskaŭ elmortinta en sia indiĝena teritorio. Sed en sia revua formo, ĝi estas internacie havebla senpage, kaj ni esperas ke vi enhejmigos ĝin, nutros ĝin per viaj legado kaj kontribuo de enhavo, kaj ĝuados ĝin.

Adreso por ĉiuj komunikaĵoj, por peti ekzempleron aŭ por peti abonon, kaj por sendi kontribuaĵon:

mirmekobo@mac.com

Abono al la revuo estas senpaga. Ĉar neniuj surpapere presitaj ekzempleroj ekzistas, neniu preskosto ekzistas. Se vi deziras mem per via komputila presilo presi ekzemplero(j)n, por vi mem aŭ por aliaj, tion vi rajtas fari laŭdezire kaj senpage.

La revueto Mirmekobo estas sendependa, kaj subtenas neniun ismon. Artikolojn povas kontribui iu ajn. Tre bonvenaj estas literaturaĵoj: noveloj, poemoj, prozaĵoj iaspecaj; esprimoj de vidpunkto; historiaĵoj; prezento de interesaj hobioj; biografiaĵoj, aŭtobiografiaĵoj; legendoj, mitoj… Bildoj, ĉu fotoj, ĉu desegnaĵoj, ĉu klarigaj, tre bonvenos. Reklamojn, anonc(et)ojn, propagandon, lingvajn studojn aŭ kritikojn, pornaĵojn, Mirmekobo malakceptas. La redaktoro rajtas akcepti, modifi, aŭ malakcepti ian kontribuaĵon, kiun li opinias malkonforma al la karaktero kaj reputacio de la revueto. Korektojn evidente bezonajn li rajtas fari, konsultinte la verkinton.

Malnovaj numeroj de *Mirmekobo* troviĝas ĉe www.gazetejo.org/mirmekobo kaj ankaŭ ĉe la retejo de la redakcio:

http://web.me.com/donbroadribb1/

Redaktoro: Donald Broadribb